

22. La krucon mi rigardu



1. La kru-con mi ri-gar-du en ĝo-jo kaj do-lor'.



Sub Vi-a kruc' ek-ar-du en a-mo mi-a kor'.

2. Eĉ se la mond' allogas per pompa trompa ŝajn':
La kruc' ĉielen vokas. Vi estos mia gajn'.
3. Sub Via kruc' silentas la ted' de mia ag',
malgrava sin prezentas la ĉiutaga plag'.
4. Kaj kiam venos morto kaj prenos ĉion for:
La kruc' per Via forto min portos al la glor'.

*LASS MICH IN LUST UND SCHMERZEN • M (Christus, der ist mein Leben):
Melchior Vulpius 1609, EG 516, GL 662 • germana T: buŝe transdonita • E:
Christa Koss kaj Albrecht Kronenberger 2004*